

Zdeněk Matěj Kuděj (1881-1955)

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo en Brno, la 17-an de oktobro 2018

Moto: **“La hejmo de vaganto estas la tuta mondo”.**

Zdeněk Matěj Kuděj, 1952

Zdeněk Matěj Kuděj, propranome Zdeněk Marian Krejčí (**Bildo 1**), naskiĝis la 24-an de novembro 1881 en Hořice sub Gigantmontaro (Bohemio). Li havis ses bofratojn. Lia patro estis inĝeniero, kiu konstruis fervojojn. Tial lia familio ofte translokiĝadis. La patro baldaŭ mortis. Kuděj ne estis bona studento, tial li ne finis sian mezlernejan studadon. Li laboris kiel meta komercanto en apoteko en Pacov. Kiam li en Pilzeno devis rekruti en aŭstro-hungaran armeon, li sukcese simulis psiĥikan malsanon. Tial li estis liberigita de arma servo. En la apotekon li neniam plu revenis. Li volis vidi maron, malproksimajn landojn.

En la jaroj 1902-1903 li nelonge laboris en farmacia firmao en Germanio. En hamburga antaŭurbo Altona li gajnis ŝipbileton por navigado en Novjorkon. En Usono kaj Kanado li vagis ses jarojn (1903-1909). Nesciante anglan ligvon li volonte faris iujn ajn laborojn, por ke ne mortu de malsato. Li laboris en buĉejo, ĥemia vestaĵpurigejo, estis kolorigisto, lavis vazojn en gastejoj.

En Cleveland li vendis brandon, laboris en gisejo kaj apoteka helpanto.

En Chicago li estis korpogardisto de milionulo, poste laboris en redakcio de loka ĵurnalo.

En Alabamo li konstruis fervojon, rikoltis maizon.

En Ohio li estis nokta kuiristo.

En Norda Dakoto li estis vakero.

En Oregono li minis oron.

Krom tio li havis multe da aliaj profesioj. Kiam li havis sufiĉe da mono, li eĉ posedis malgrandan ranĉon.

Usonanoj ne kapablis prononci lian ĉeĥan nomon Zdeněk Kuděj, tial ili lin kromnomigis Sidney Good Day.

Antaŭ reveno en Eŭropo li estis kuracita en presbiterana malsanulejo, ĉar suferis de pneŭmonio. Ĉeĥa viro en Usono kaj Kanado ne perdiĝis.

Post reveno el Usono (1909) li trovis laboron: li fariĝis helpanto de masonistoj. Dum laborado li amuzigis siajn kunlaborantojn per rakontoj pri sia vagado en Usono kaj Kanado. Masonista majstro, lia ĉefo, rekomendis al li sendi unu fabelon en redakcion de ĵurnalo. La rakonto, kiun Kuděj verkis, estis akceptita kaj publikita. Kuděj havis ĉe la masonistoj tagan salajron 8 kronoj. Por sia rakonto li perlaboris trifoje pli multe: 24 kronojn. Tio lin gvidis al decido fariĝi profesia verkisto. (Simile kiel usona verkisto Jack

London.) Kuděj verkis multe da rakontoj, kiuj estis publikitaj en ĉeĥaj ĵurnaloj Zlatá Praha, Právo lidu, Národní obzor, Samostatnost, Lidové noviny, Světozor, Národní noviny, Venkov, Český svět k.a.

Kial li estis tiel sukcesa? Famaj verkistoj Karl May (1842-1912) kaj Jules Verne (1828-1905) verkis aventurajn romanojn, sed hejme kaj antaŭ verkado eĉ ne vizitis la landojn, pri kiuj ili verkis. Kuděj eksciis Usonon persone. Tie li devis ellerni anglan lingvon, veturi per vartrajnon (kiel Jack London (1876-1916) kaj Jack Kerouac (1922-1969), minis oron, estis vakero, multfoje estis malliberigita. Li eksciis veran vivon en Usono kaj Kanado, provis multe da profesioj, vidis ne nur sukcesajn, sed ankaŭ nesukcesajn homojn, kiuj vundiĝis aŭ mortis. Li devis trakti kun homoj de diversaj naciecoj kaj ĥarakteroj. Li en la mondo ne perdiĝis, simile kiel ekzemple moravia mondvagulo Jan Eskymo Welzl (1868-1948). Kuděj vidis belecon kaj malbelecon de Usono, aŭdis rakontojn de multe da homoj. Krom tio li mem estis bonega rakontanto.

Li verkis kvartoman romanon Sid, la romanojn Mezi dvěma oceány (Inter Du Oceanoj), Bídny dny (Mizeraj Tagoj), Majitel zlatých polí (Posedanto de Oraj Minejoj), Z Nového světa (El Nova Mondo), Mordovna (Laciga Laborejo), Rvavý Holybee (Holybee, la Batemulo) k.a.

Li konatiĝis kun boemanoj, ekz. kun fama verkisto Jaroslav Hašek, František Sauer Kysela, Emil Arthur Longen, pentristoj Josef Lada kaj Jaroslav Panuška kaj Bob Hurikán. Tio estis stranga kompanio.

Jaroslav Hašek (1883-1923) estis boemo, satiristo, soldato, legiano, komisario de Ruĝa Armeo, aŭtoro de romano pri brava soldato Ŝvejk.

František Sauer Kysela (1882-1947), estis boemo, kontrabandisto de sakarino, verkisto, komercanto kaj praga ĥuligano, kiu la 3-an de novembro 1918 kun siaj amikoj neniigis Kolonon de Virgulino Maria el la jaro 1652 en Malnovurba Placo en Prago. Li diris, ke la kolono estas simbolo de regado de Habsburgoj super ĉeĥoj. Tio ne estis vero, ĉar la kolono estis konstruita en la jaro 1652 kiel danko de praganoj por savo de Prago, kiun atakis svedoj en la jaro 1648. Tiam ne nur soldatoj, sed ankaŭ civitanoj, urbanoj, studentoj, pastroj danke al helpo de Virgulino Maria sukcese defendis sian urbon kaj venkis profesiajn svedajn soldatojn. Pro tio la kolono estis konstruita. (Neniu registaro ĝis nun permesis renovigon de la kolono.)

Emil Arthur Longen (1885-1936, propranome E.A. Pitterman) estis talentita aŭtoro de teatraĵoj, sed ankaŭ boemo, ebrulo kaj eterna prunteprenanto.

Josef Lada (1887-1957) ilustris multe da librojn, ekz. la romanon pri Ŝvejk.

Jaroslav Panuška (1872-1958) pentris precipe pejzaĝojn.

Juna Bob Hurikán (1907-1965, alikromnome Bob Peters, propranome Josef Peterka) estis metiisto, roantiko, trampo, ekde la jaro 1916 skolto, fondinto de kelkaj trampejoj. Li tre admiris Kudějjon, ĉar li verkis aventurajn romanojn pri Usono (ekz. Arizonaj Ĉevalrajdistoj, Pia Pafisto) kaj Kuděj povis multe al li rakonti pri vera vivo kaj pejzaĝoj en Usono. La plej valora libro de Bob Hurikán estas la libro Dějiny trampingu (Historio de Trampado), kie li

dokumentis historion de trampejon en Ĉeĥoslovakio ekde la 20-aj jaroj de la 20-a jarcento ĝis la 6é-aj jaroj. Bob Hurikán estis ankaŭ batalanto kontraŭ naziismo. Li havis kaŝitajn armilojn por ĉeĥaj kontraŭnaziaj gerilanoj sub planko de sia trampa kabano. Li estis aŭtoro de multaj trampaj kantoj (ekz. la kanto Rikatado).

En la jaro 1912 Kuděj vizitis Ruslandon. En Kijevo li estis malliberigita, ĉar cara polico verŝajne lin konsideris spionon. Krom tio li iomete aspektis kiel iu serĉata anarĥiisto. Ses monatojn li travivis en malliberejo, kie eksuferis de revmatismo. Poste li estis liberigita, ellandigita kaj eskortita al aŭstra limo. Pri cara malliberejo li verkis la libron Hostem u báťušky cara (La Gasto de Batjuŝko Caro).

En la jaro 1913 li ricevis premion de Julius Zeyer por sia libro Bídny dny (Mizeraj Tagoj).

Du jarojn li vagis kun Jaroslav Hašek, František Sauer kaj aliaj amikoj. Li gajnis monon per laboro en mebla fabriko de la kompanio Baumgartel k.a. en Prago-Karlín, sed tiam li jam tre suferis de revmatismo. Kiam li revenis al sia patrino en urbeton Příbram, li ricevis rekrutigan ordonon. Sed kion li povis fari, se li suferis de revmatismo? En kazernon li estis transportita sur ĉareto. Tiun sceno uzis lia amiko Jaroslav Hašek en sia romano pri brava soldato Švejek. La komisiono devis lin agnoski nekapablulon por necerta tempo.

Kiam li vizitis Pilzenon, en kazerno li eksciis, ke skribisto de lia regimento eraris skribinte, ke soldato Zdeněk Kuděj falis por monarĥio en Serbio kaj estis entombigita ie proksime Šabaco. Tial Kuděj loĝis en Prago ofte ŝanĝante siajn rezidejojn. En la jaro 1915 lia amiko Hašek rekrutiĝis. Tial Kuděj foriris en Pilzenon, kie li eklaboris en fabriko Škoda.

En Pilzeno hungaraj militgardistoj kontrolis liajn dokumentojn, kiuj al ili ne plaĉis pro granda amaso da ŝtampoj. Kuděj sukcesis fuĝi en Pragon, sed tie militoficistoj lin trovis. Li ne estis sendita en fronton, ĉar suferis de revmatisma atako, sed devis servi sen armeo kiel arma skribisto. El Beroun li estis transportita en Vienon, kie li helpis al arma episkopo skribi mortatestojn. Tio estis trankvila laboro en oficejo. Bedaŭrinde en Vieno Kuděj havis konflikton kun germanigita ĉeĥa pastro. Ili ekkverelis, la germanigita pastro nomigis Kudějjon „ĉeĥa porko“ kaj temperamenta Kuděj ĵetis kontraŭ la pastro pezan dosieron. La pastro plendis kaj Kuděj antaŭ arma juĝa komisiono denove devis ludi frenezulon. Ĝis fino de la mondmilito li estis kuracata kiel psiĥiatra paciento de profesoro Prusík en Klinikon Thomayer.

Post la mondmilito doktoro Jiří Guth, prezidanto de Klubo de Ĉeĥaj Turistoj, proponis al Kuděj trankvilan laborlokon de kluba sekretario. Sed Kuděj tie nur nelonge kapablis labori.

Li mallonge redaktis Armean Bultenon.

En la jaro 1920 li edziĝis. Sinjorino Božena Frýdlová, loĝejmastrino kaj poste edzino, donis al Kuděj komforton de hejmo, sed eterna vaganto en edzeco estis tre malfeliĉa. Li ne povis vizitadi gastejojn, babilis kun amikoj... Tial li baldaŭ forlasis sian edzinon, neniam divorcis, sed neniam plu al ŝi revenis.

Kuděj ankaŭ loĝis kelkajn jarojn en Ukrainio. Valoraj estas liaj libroj pri batalo de huculoj (rutenoj) por libereco. Li priskribis batalon de huculoj, kiuj defendis sian teritorion

kontraŭ hungaroj kaj rumanoj. Hucula Respubliko (ukraine: Гуцульська Республіка) kun ĉefurbo Jasinja ekzistis nur ekde januaro ĝis la junio 1919 kaj neniu ŝtato ĝin agnoskis. Kuděj priskribis defendo de huculoj kontraŭ hungaroj kaj rumanoj en la romano Horalská republika (Montanara Respubliko).

Kuděj priskribis ankaŭ defendon de Ĉeĥoslovakio kontraŭ atakoj de hungaraj komunistoj post la unua mondmilito. La komunisto Béla Kun (1886-1938, propranome Béla Kohn), kiun fervore subtenis sovetaĵ komunistoj, kreis tiel nomatan Hungaran Sovetrespublikon (hungare: Magyarországi Tanácsköztársaság), kies batalantoj atakis Slovakion. Laŭ ekzemplo de Hungara Sovetrespubliko (21.3. -1.8.1919) en Slovakio ekestis Slovaka Sovetrespubliko (slovake: Slovenská republika rád, 16.6.-7.7.1919), kiun gvidis ĉeĥa komunisto Antonín Janoušek (1877-1941). Tial ĉeĥoslovakaj soldatoj kaj maristoj, kiuj transvivis la unuan mondmiliton, en la jaro 1919 devis denove batali kaj venki ambaŭ komunistajn efemerajn politikajn subjektojn en ĉeĥoslovaka teritorio.

Kuděj loĝis kun familio de sia amiko Jaroslav Panuška en Kocháňov. Poste li loĝis en Radostovice en la dometo nomata Karasovna kun amiko Josef Kolář. Li ŝatis infanojn kaj bestojn, estis modesta, amikema kaj tre purema.

Kiam mortis Jaroslav Hašek (1923), Kuděj estis unu el malmultaj amikoj, kiuj staris super tombo de Hašek dum entombigado.

Vizitante sian fraton en Dolní Kralovice li ŝatis melhundon Fylásek. Li verkis libron „O Fyláskovi“ („Pri Filasek“) por infanoj.

Vintre en Humpolec Kuděj vizitadis ĉefkuraciston Melichar, kiu elpelis el lia korpo longan cestodon. La ĉefkuracisto kreis el tiu ĉi parazita platvermo alkoholan preparaton, kiun montradis al kolegoj. La preparato jam ne ekzistas, ĉar en la jaro 1945 sovetaĵ soldatoj la cestodon forĵetis el ujo kaj tutan alkoholon (etanolon) fortrinkis.

En Ledeč Kuděj loĝis ĉe sinjorino Hana Krupičková (en la Strato Svatojiřská, nuntempe la Strato Havlíčkova, numero 161). Tie li skribis sian romanon „Mariánská huť“ („Mariana Metalurgia Uzino“), kiu estis eldonita nur en la jaro 1964 en Havlíčkův Brod (nur naŭ jaroj post morto de la aŭtoro).

Zdeněk Matěj Kuděj dum siaj vagadoj eksciis naŭ lingvojn, tial li tradukis (ekz. romanojn de Walter Scott, Charles Dickens k.a.). Bedaŭrinde li nenam uzadis vortarojn, tial liaj tradukoj ne estas precizaj, fakte tio estas libere tradukitaj rakontoj de Kuděj.

Li tradukis la romanon de Edgar Rice Burroughs (1875-1956) „Tarzan“, kiu estis eldonita en la jaro 1912 kaj kies angla originalo („Tarzan of the Apes“) havis 24 volumojn. Kuděj, kiu bone eksciis stupidecon de la verkaĵo, tradukis sep volumojn, por ke gajnu monon, sed poste li el Tarzan kreis avon. Kiam la avo Tarzan al legantoj neplaĉis, ili eĉ plendis kaj protestis, Kuděj verkis pli ol 500-paĝan humuran novelon „Tarzanova babiĉka“ („La Avino de Tarzan“), en kiu mokis ne nun rakonton pri Tarzan, sed ankaŭ ĝiajn naivajn legantojn. Titolan paĝon de la libro Avino de Tarzan ilustris fama pentristo Josef Lada (**Bildo 2**).

Pri Ruslando Kuděj publike diradis, ke tie vivas nur tri grupoj da homoj: la homoj, kiuj estis malliberigitaj, la homoj, kiuj estas malliberigitaj, kaj la homoj, kiuj estos malliberigitaj. Tio kompreneble ne plaĉis al regantaj komunistoj post la jaro 1948. Kuděj multe verkis, sed li neniam estis akceptita en Ĉeĥoslovakana Asocion de Verkistoj (fondita en la jaro 1949).

En Litomyšl Kuděj loĝis ĉe sia amikino Anna Soukupová kaj ŝia edzo, kiuj por li aranĝis ĉambron. Kuděj pro sia bonkora konduto al infanoj kaj virinoj baldaŭ fariĝis fama kaj populara persono de la urbo. Profesoro Zdeněk Nejedlý (1878-1962), kiu devenis de Litomyšl, estis ekde la jaro 1939 komunisto kaj dufoje (1945-1946, 1948-1953) estis ministro de kulturo en registaro de Gottwald. (Lia familia nomo, la adjektivo „nejedlý“, ĉeĥe signifas „nemanĝebla“). Profesoro Nejedlý faris multe por nia kulturo, sed kiel maljunulo li diletante komentis fakte ĉion, tial li ofte estis mokata kaj neŝatata. Li, potenca socialisma ministro de kulturo, invitis Kudějjon al komuna tagmanĝo. Kuděj polite al li respondis: „Výsosti, děkuji, raději poobědvám s lidmi...“ („Ekscelenco, dankon, mi preferos tagmanĝi kun homoj...“).

Fino de vivo de Kuděj similis al lia vivo. Kuděj suferis de hernio. Li estis operaciita (la 13-an de julio 1955). Sed post du tagoj li, eterna vaganto, kiu ne kapablis elteni striktan malsanulejan reĝimon, nesufiĉe vestita fuĝis el malsanulejo kaj kaŭze de malvarma vetero malsaniĝis de pneŭmonio. Li mortis la 8-an de aŭgusto je la 14-a horo. Lia tombo troviĝas en tombejo en Litomyšl (**Bildo 3**).

„Mi ne timas morton atendante ĝin kun humuro. Oni devas scii la vivon, por ke la vivo estu bela.“

Zdeněk Matěj Kuděj

Rekomendita literaturo

- HAMPL, F. (1971): Krátké manželství humoristovo. O Z.M. Kudějovi. 1-a eld., Vysoké Mýto, Vzorná městská lidová knihovna, 20 paĝoj.
- HAŠEK, J. (2003): Politické a sociální dějiny Strany mírného pokroku v mezích zákona. 1-a eld. en la eldonejo. Prago, Levné knihy KMa, 314 paĝoj.
- HURIKÁN, B. (1990): Dějiny trampingu. 2-a eld., Prago, Novinář, 272 paĝoj.
- KUDĚJ, Z.M. (1932): Horalská republika. 1-a eld., Prago, Sfinx B. Janda, 327 paĝoj.
- KUDĚJ, Z.M. (1947): Hostem u bařušky cara. 1-a eld., Prago, Toužimský a Moravec, 315 paĝoj.
- KUDĚJ, Z.M. (1948): Když táhne silná čtyřka. 2-a volumo, 1-a eld., Ostrava, Svět, paĝoj 321-644.
- KUDĚJ, Z.M. (1959): Dobrodružné cestování. 1-a eld., Prago, Československý spisovatel, 375 paĝoj.
- KUDĚJ, Z.M. (1960): Safijánská zima. 2-a eld., Havlíčkův Brod, Krajské nakladatelství, 87 paĝoj.
- KUDĚJ, Z.M. (1999): Tarzanova babička. Senzační odhalení ze života slavné opí dámy. Humoristický román. 2-a eld., Praha - Litomyšl, Ladislav Horáček - Paseka, 527 paĝoj.
- NOVÁKOVÁ-PLEVOVÁ, E. (2017): Zdeněk Matěj Kuděj. Věčný tulák. 1-a eld., Pelhřimov, Nová tiskárna, 42 paĝoj.
- URBANOVÁ, J. (2004): Brněnští mariňáci. Poslední veteráni rakouského válečného loďstva. 1-a eld., Brno, Barrister & Principal, 155 paĝoj.
- VŠETIČKA, F. (2017): Kuděj aneb Krása kuráže. O Zdeňku Matěji Kudějovi a lidech kolem něho. 1-a eld., Olomouc, Poznání, 245 paĝoj.

Bildo 1: Zdeněk Matěj Kuděj (1881-1955)



Bildo 2: Avino de Tarzan (la titolan paĝon kreis Josef Lada)



Bildo 3: Tombo de Z.M. Kuděj, la verkisto, en Litomyšl (la 25-an de aŭgusto 2018). Foto: O.A. Fischer

